

Laborplano de la Lerneja Komisiono por 2011

1. Revigligi la agadon de la lerneja komisiono per daŭraj kontaktoj inter ties anoj.
2. Krei aŭ revigligi ILEI-sekciojn en Hispanio, Britio, Bulgario, Irano, D.R. Kongo kaj Rusio kaj aliaj landoj laŭeble kun la helpo de ceteraj estraranoj.
3. Teni la komisionanojn informitaj pri la nuna stato de la lerneja agado en Esperantujo. (Statistikoj pri nuna instruado en lernejoj helpe de edukado.net)
4. Starigi kontaktojn kun la fakdelegitoj pri instruado de UEA tra la tuta mondo por informiĝi pri la lerneja agado.
5. Diskonigi kaj sukcesajn demarŝojn cele al la instruado de Esperanto en la diversaj mondpartoj kaj rimedojn, kiujn esperantistoj kreas por persvadi pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn.
6. Krei konsilaron kaj sendi ĝin al novaj instruantoj kaj al la hejmapaĝo de ILEI.
7. Flegi la rilatojn inter ILEI kaj la novaj instruantoj. Teni kontaktojn kun latin-amerikanoj partoprenintaj la Seminarion ene de la 43a ILEI-Konferenco.
8. Daŭre subteni la instruagadon de multjaraj spertaj instruistoj. Elstarigi ilian laboron.
9. Verki kaj sendi instrumaterialojn al la instruistaro, ĉefe al novaj instruantoj aparte en malpli riĉaj landoj.
10. Subteni interesajn iniciatojn en la instrua kampo speciale pri lerneja agado, instrukapablo kaj ekzamenoj.
11. Kompili informojn pri la stato kaj kondiĉoj de E-instruado.
12. Daŭre atenti kaj flegi la evoluon de korespondaj kursoj en landoj kie tiuj ekzistas.
13. Subteni laŭeble la diversajn projektojn de ILEI tra la mondo (Interkulturo, Flugiloj de malfacila vento, IĈLM, AKEL, projekto 'esperanto125', ktp.)
14. Kunlabori kun la projektoj de <edukado_net> kaj aliaj organizoj kiuj perrete provizas helpon por instruistoj, ekz. Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, kies retadreso estas <<http://www.icxlm.org>> kaj JUNAC Civitanoj Sen Landlimoj kiun oni povas kontakti ĉe <eliz.barbay@wanadoo.fr> aŭ <junaj-civitanoj-sen-landlimoj@googlegroups.com>.
15. Kunlabori en la projekto "Flugiloj de malfacila vento" por krei pli facilan sistemon de instrukapablo kaj por kunverkado de metodikaj libroj.

Proponas: Julián Hernández Angulo, Ron Glossop kaj aliaj komisionanoj. Marto, 2011.